NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°. 28012 Madrid
☎ lunde vespere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
SEPTEMBRO-OKTOBRO 1995

**KUN BEDAÚRO NI ADIAŬAS AL PEDRO GARROTE KIU TRANSLOKIĜIS AL VALLADOLID. NI DEZIRAS AL LI SUKCESON EN LA NOVA URBO**

## KOMPUTILA ESPERANTO-KURSO

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo tradukis al la hispana la portugala adaptita versio de la kurso por komencantoj, programita en Usono por Todd Moody. Ĝi konsistas el multaj unuekranaj lecionoj, kiuj klarigas por unu gramatika ero kaj metas kontrolan demandon, funkcias per ĉiaj PC-kpmgruaj komputiloj, eĉ per tre malnovaj, ne tro potencaj. Í estas havebla kontraŭ 1000 PTA ĉe "Gazeto Andaluzia". Armengual de la Mota 33-4°D. 29007 Málaga. Indiku kian diskon vi volas. La CD-ROMa kurso estis publikigita en la revuo "CdWare Multimedia" de septembro

## VIZITAS MEL

Dum julio ĉeestis en nia konversacia rondo S-ro Petro Muranyi el Hungario, li restis en Madrido dum tri semajnoj por partopreni en Kurso de la UNED (Distanca Universitato). Li parolis pri "Hungario kaj la Esperanto movado" en sia urbeto.
Wladimir Ionessov, el Urzbekistano, prelegis en nia grupo dum septembro pri "Samarkando, la blua urbo" kaj pri "Tombejoj de la bronza epoko en Centra Asio". Li vizitis Hispanion kiel partoprenanto de arkeologa-antropologa kongreso en Santiago de Compostela.

## HISPANIO

Dank'al la laboro de D-ro Pérez Óvilo, la Nobel premio pri economio P-ro Selten (esperantisto), venos al **Murcio** la venontan marton; li akceptis inviton de la Dekano de la Murcia Universitato por partopreni en Seminario por katedruloj kaj profesoroj. Li parolos ankaŭ en esperanto. (Pli da informoj en venontaj numeroj)

En San Javier (**Murcio**) la Konsilantaro pri Kulturo de la Urbodomo apogis kaj subtenis someran kurson de Esperanto por eksterlandanoj. Antaŭe okazis trimonatan kurson kun 40 gelernantoj.

Andaluzia E-Unuiĝo lanĉis planon por aperigi en la organo de la **Malaga** Komerca Ĉambro informojn ankaŭ en Esperanto pri naciaj entreprenoj agantaj internaciskale.

## *HEF ANGULO* *(Ne oficiale)*

La Centra Oficejo aĉetis modemon por faciligi komunikadojn pere de informatikaj autovojoj (elektronika-poŝto, interŝanĝo de sliparoj, konsulto al internaciaj datumbasoj, ktp.)

La "Lexicón Sopena" acetitaj de S-ro Galofré estis nur 20, ili estas la tutan stokon ĉar, laŭ la madrida distribuanto de tiu-ĉi eldonejo, ne restas ekzemplerojn, oni atendas novan eldonon por la venontan jaron.

## UK EN FINLANDO

Tri membroj de la Liceo ĉeestis la Universalan Kongreson, Ana Manero, Manolo Parra kaj Cesar Mosteyrín. Aparte de ili ni havas konfirmon de alia hispanoj kiuj ankaŭ vojaĝis al Tempere: Luis kaj Rafaela (Valladolid), Julio Argüelles (Gijón) kaj Nicolás kaj Mª Luisa (Avilés). Ana kaj Manolo ankaŭ partoprenis en la Junulara Kongreso en San Petersburgo. Cesar, post UK, ekzkursis kun pol(in)a grupo norden, ĝis polarcirklo, kaj al Svedio, Germanio kaj Varsovio ekde tie, trajne, vizitis Praga.

## IBERA SKOLO EN BELARTAJ KONKURSO

La fama konkurso de UEA konfirmis la poeton Gonçalo Neves, el Portugalio, li ankakŭ estis premiita en prozo kun la verko "La lirika itinero de Miguel Fernández". Georgo Kamaĉo atingis la trian premion de prozo kun la verko "Neniam plu".

**JAM ESTAS PRETA LA KRISTNASKA LOTERIO, KIEL KUTIME NI KALKULAS JE VI.**

LOTERIO¡¡¡ **N-ro 45.678** PO 200 PTA.

**LOTERIA DE NAVIDAD. En envían pedidos previamente abonados. Hasta 2000 PTA se acepta el pago en sellos de correos de 19 PTA. Estamos en Atocha 98-4° los lunes de 19.00 a 21.00**

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°**

Marde ekde la 18,00 ĝis la 20,30 h. funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 8079

Ĉe la kafejo Villa de Madrid, en Plazo de Colón (sub la ĝardeno), okazas parolrondo la 1-an kaj 3-an merkredojn de ĉiu monato. Je la 19.00 horo. Kutime gvidas ĝin Ana Manero.

Ekde oktobro Carmen Suárez, kune kun Antonio Tur, instruas bazan kurson de Esperanto en Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00 (Meze de oktobro jam ne ekzistis liberan lokon). Antonio Tur daŭrigas la instruadon ĉe "Hogar del Pensionista Puente de Toledo"

Venontaj prelegoj ĉe la Liceo, je la 19.00 horo.
2a de oktobro. "Tra la "inkaaj" vojetoj: Peruo". Lupe Sanz
16a de oktobro. "Esperanta somero en Polando". Santiago
13a de novembro. "Malto, mediteranea insulo". Carmen Suárez.

## RADIO VATIKANO JUBILEAS

En julio Radio-Vatikano festis la elsendo numero 2000 de regulaj esperantoj programoj. La redakcio konservas ĉiujn tekstojn de siaj elsendoj dum 18 jaroj(informoj, specialaj servoj, raportoj, intervjuoj, legitaj leteroj ktp.). Laŭ universala tempo la elsendoj, pere de meza ondo (kHz) kaj mallonga ondo (m), estas jenaj: Por Eŭropo via rakedo; Dimanĉoj kaj feriaj tagoj je la 19.20h, Esperanto, 527-1530 kHz, 4005/5885-MN (75/49m). 2a programo; Merkrede je la 19.20h, Esperanto, 1611 (kHz), 6185-A (75/49m) kaj 7365-A (41m)

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

- ★ 27a Kataluna Kongreso de Esperanto. 12a ĝis 15a de oktobro. Mataró (Barcelono)
- ★ 3a Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-Semajno. 4a-11a de novembro. Salou (Tarragona)
- ★ 54a Hispana Kongreso de Esperanto. Salou (Tarragona). 9-12 novembro

## MIGUEL FERNÁNDEZ

Nia kara Miĉjo partoprenis en la XVI-a Internacia Literatura Forumo en Gdansk (Pollando) kune kun kvindeko da partoprenantoj el deko da landoj. Li prezentis, laŭ la sekcio "amo en literaturo", sian prelegon "Magia liriko de Federico García Lorca" kaj autoran recitalon "La spuroj de viaj piedoj"
Miguel kontribuos al la kultura programo en la venonta Kataluna Kongreso organizita de KEA (12-15 oktobro-Mataró).

## NEKROLOGO

Je la aĝo de 92 jaroj forpasis Luis de Otaola, la plej veterana membro de la E-grupo de Bilbao. Dum la lastaj jaroj ankaŭ vizitis kutime la konversacian rondon de la madrida grupo. Pace ripozu.

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal